

世界语读物选

第一册

白松 编

北京市世界语协会 审定

知识出版社

062561



精工製本號802 2 00857364

世界语读物选 Esperantaj Legaĵoj Elektitaj

(I)

第一册


57 104/50

白松 编

北京市世界语协会审定

Kompilita de Baj Song

Polurita de la Pekina Esperanto-Asocio



知识出版社

1985 北京

内 容 提 要

为了满足已经学过世界语初级课程读者的需要，我们编辑了这本“世界语读物选”，全书共分上中下三册，撰各国世界语作品150多篇。内容丰富，题材多样，具有浓厚的趣味性和知识性。

全书由谚语、故事、轶事、寓言、对话、讲演、诗歌、书信、小说、戏剧等部分组成。第一册所收的是短小易懂的作品，适合具有初级班水平者阅读。

世界语读物选（第一册）

白 松 编

知识出版社出版

（北京安定门外外馆东街甲1号）

新华书店北京发行所发行

北京通县长城印刷厂印刷

开本：787×1092 1/32 印张：4·25 字数：136千字

1986年2月第1版 1986年2月第1次印刷

印数：0001—8,000册 书号：9214·38 定价：1.28元

前 言

据统计，我国近几年来已有二十万人学习世界语。他们大多数学了世界语初级课程，急需继续学习和提高，但不少人由于缺乏合适的阅读材料而中断学习。为了满足他们的要求，我们编辑了这本《世界语读物选》。

全书分上中下三册，共选入各国世界语作品150多篇，其中有世界语大师柴门霍夫、尤里·巴基、卡贝等人的部分优秀作品。这本书的内容丰富，题材多样，文字优美，表现法新颖，具有浓厚的趣味性和多方面的知识性。

全书由谚语、故事、轶事、寓言、对话、讲演、诗歌、书信、科技知识、小说、戏剧等部分组成。内容由浅入深，并加了必要的注释。第一册所收的是短小易懂的作品，适合具有初级班水平者阅读；第二册所收的是优秀的中篇作品，适合具有中级班水平者阅读；第三册所收的是世界语经典著作，是进一步提高世界语水平、研究世界语的必读材料。

由于时间仓促，水平有限，难免有不妥之处，敬请读者指正。

编 者
1985年11月

Enhavo

| | |
|----------------------------------|----|
| I. Proverboj | 1 |
| II. Spritaĵoj | 6 |
| III. Dialogoj | 17 |
| IV. Anekdotoj kaj Rakontoj | 30 |
| V. Poemoj | 61 |
| VI. Esperanto kaj Zamenhof | 65 |
| VII. Leteroj kaj Tagnotoj | 71 |
| VIII. Notoj | 79 |
| IX. Vortareto | 85 |

PROVERBOJ

A

Agoj estas fruktoj, vortoj estas nur folioj.
Al vi mem pardonu nenion, al aliaj ĉion.
Altaj arboj jetas longajn ombrojn.
Al regalita la lang' ligita.¹

B

Bela estas, kiu bele agas.
Bona reputacio² pli valoras ol oro.
Bona komenco, duona fino.
Bono kunigas, malbono disigas.
Bona gloro pli valoras ol oro.
Bovido ĵus naskita ne timas tigron.
Birdo amas la liberecon pli ol oran kaĝon.
Beleco sen boneco estas domo sen pordo.

Ĉ

Ĉie la korvoj same nigras.
Ĉio havas sian "sed" kaj "se".
Ĉiu mano estas bela, kiu donacas.

D

Donu al la lupo iom, ĝi postulos ĉiom.
Du militas, tria profitas.
Donacanta mano ne malriĉiĝas.

E

En la regno de l' blinduloj la unuokululo³ estas reĝo.
En vino dronas pli multe da homoj ol en akvo.

Estante inter la lupoj, oni devas boji kun ili.

Espero ne satigas.

El kie vi venas, tien vi revenos.

En la sama boato, kun la sama sorto.

Estas tiel facila kiel manturno.⁴

El tri ŝuflikistoj banalaj, formiĝas saĝulo senegala.

F

Fajron estingas akvo, pekon pardono.

For de l' okulo — for el la memoro.

Foresto plifortigas la amon.

Financa vundo ne estas mortiga.

Finiĝo bona, ĉio bona.

Feliĉo kaj malfeliĉo loĝas sub la sama tegmento.

G

Gutoj post gutoj eĉ ŝtonon traboras.

Ĝ

Ĝis morto laboras, ĝis morto lernas.

H

Hundo gardanta du pordojn⁵ restos malsata.

Hundo, kiu bojas, malofte mordas.

Hodiaŭan taskon ne prokrastu ĝis morgaŭ.

K

Kiu ridas vendrede, ploros dimanĉe.

Kiu faras sin ŝafu, tiun manĝos la lupo.

Kiu ne volas labori, tiu ne devas manĝi!

Kiu havas blankan panon, tiu rifuzas la nigran.

Kiu volas edziĝi kun la filino, rigardu antaŭe al la patrino.

Kiu ne lernis obei, tiu ne povas ordoni.

Kiu deziras ricevi ovojn, ne rostu la kokonon.⁶

Kiu semas malamon, ne povos rikolti amon.

Kiam la kato ne estas hejme, tiam la musoj dancas sur la tablo.

Kiu timas lupojn, ne iru en arbaron.

Kiu silentas, ties lango ne doloras.
Kiu vin frapas, tiu vin amas.
Kiu iras tra bulbokampon, tiu odoras laŭ ĝi.
Kiu volas, tiu povas.
Kion vi juna lernis, tion vi maljuna posedos.
Kion vi semis, tion vi rikoltos.
Kiu du leporojn ĉasas, tiu ja neniun kaptos.
Kiom da domoj, tiom da moroj.
Kiom da kapoj, tiom da opinioj.
Kie fumo, tie brulo.
Kio mia, tio bona.
Kiel vi estas laboranta, tiel vi estos manĝanta.
Kiu estas seminta, estos rikoltinta.
Kiu multe minacas, tiu ne danĝeras.
Kio timigas forte, tio ne danĝeras ofte.
Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas.
Kiu demandas foj' post fojo, ne misiras sur la vojo.

L

La plej delikata belulo, troviĝas en la okuloj de karulo.
La justa multe ricevas helpojn, la maljusta ne.
La aglo naskas aglon; sed strigo nur naskas strigon.
Longa foresto mortigas la amon.
La paco konstruas, malpaco detruas.
La luno ne ĉagreniĝas, kiam la hundoj albojas ĝin.
Laboro havas maldolĉan radikon, sed dolĉan kernon.
La poto insultas la kaldronon nigrulo.
La komenco estas ĉiam malfacila.
La malpermesitaj fruktoj estas la plej bongustaj.
La malsano venas rajdante, sed foriras piede.
Laŭ la oreloj oni ekkonas la azenon.
La bela plumo faras belan birdon.
La vesto ne estas la homo.

M

Malbona kokino demetas ovojn malbonajn.
Malbonaj ekzemploj detruas bonajn morojn.
Malsaĝa amiko estas danĝera malamiko.
Malsata hundo ne atentas la bastonon.
Malplej granda donaco pli valoras ol plej granda promeso.
Maldolĉa por la lango, saniga por la sango.

N

Neniu estas pli mizera, ol tiu sen sano.
Ne iru du vojojn per unu fojo.
Nenie pli bone ol hejme.
Ne metu lupon kiel gardiston de ŝafoj.
Ne fidu ies laŭdon, atentu ĉies mallaŭdon.
Nefacile lernita, malfacile forgesota.
Nenion oni tuj ellernas.
Nova balailo bone balaas.
Nokto egaligas ĉiujn kolorojn.
Neniu povas salti trans sian propran ombron.
Ne provu flugi, antaŭ ol kreskis viajflugiloj.
Ne laŭdu la tagon antaŭ la vespero.
Ne ĉio estas oro, kio brilas.
Ne ĉasu du leporojn samtempe!
Ne ĉiuj estas sanktuloj, kiuj iras en la preĝejon.
Nur la unua paŝo penigas.

O

Oni manĝu por vivi, sed ne vivu por manĝi.
Oni ĵetas ŝtonojn nur al arbo, kiu portas fruktojn.

P

Prefere morti de malsato ol preni rizon de maljusta plado.
Per vorto ĝentila ĉio estas facila.
Plej bona sprito estas silento.
Pli bona io ol nenio.
Pli feliĉaj la donacintoj ol la akceptintoj.

Pli bone estas venki sin mem ol venki la tutan mondon.
Pli klare vidas apudaj rigardantoj ol la ŝakludantoj?

Post damaĝo kreskas saĝo.

Per mensogoj oni iras tra la tuta mondo, sed ne revenas.

Pacienco kaj penado traboras ĉion.

Paroli estas arĝento, silenti estas oro.

Pafarko⁸ trostreĉita tuj rompiĝos.

R

Rapida helpo estas duobla helpo.

Rato kuras trans la straton, ĉiuj krias: "Al ĝi donu baton."

Rado malbona knaras plej multe.

S

Saĝa vulpo neniam manĝas la kokinojn de sia najbaro.

Sen tigroneston eniri ne eblas tigridon akiri.

T

Tondro surdiga, pluvo nenia.

U

Unu hirundo ne faras printempon.

Unue kaptu la urson, kaj nur poste vendu ĝian felon!

Unu putra kukurbo malbonigas dek sanajn.

Unu malnova amiko estas pli bona ol du novaj.

Unue lernu, poste instru.

V

Venos aĝo, venos saĝo.

Spritajoj

La Ruzulo

Knabo (venante el la lernejo): Paĉjo, hodiaŭ vi ĝojos!
Ĉar mi nun ne plu sidas sur la lasta benko.
Patro: Vi estas bona filo! Jen, prenu pecon da ĉokolado!
Sed diru: Kiel okazis tio?
Knabo: Ho — la lasta benko nun estas riparata.

Frandemulino⁹

— Panjo, donu al mi pecon da sukero, mi petas.
— Vi ja ricevis jam unu!
— Jes, sed mi lasis ĝin fali.
— Kien do?
— En la kafon.

Tolstoj¹⁰ kaj la Policisto

La rusa verkisto kaj filozofo grafo Tolstoj vidis iam sur la strato policiston, kiu kondukis arestitan krimulon. Li alpaŝis kaj diris: “Ĉu vi ne legis la Novan Testamenton¹¹?”
— Jes, via moŝto.¹²
— Ĉu ne estas skribite en ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem?
— Jes, via moŝto. Sed ĉu vi legis la polican regularon?

— Ne.

— Do iru kaj legu ĝin.

Gentila

Du malamikaj sinjoroj renkontis unu la alian sur tre malvasta piedirejo. La unua iras rekte antaŭen kaj diras:

— Mi ne ĉirkaŭiras¹³ malsaĝulon.

— Sed mi, diris la alia, ĉirkaŭiras lin.

Li Povas Kalkuli

Instruisto: Kiom da horoj havas tago?

Lernanto: Dudek kvin.

Instruisto: Dudek kvin? Ĉu tio ne estas tro multaj horoj?

Lernanto: Ne, antaŭe vi diris: nun la tago jam pli longiĝas je unu horo.¹⁴

Li Ekkonigis Sin

La telefono de la lernejo sonoris. La profesoro iris al la telefono.

Profesoro: Tie ĉi profesoro Miller.¹⁵

Telefonanto: Mi sciigas, ke Karlo hodiaŭ ne povas viziti la lernejon, ĉar li estas malsana.

Profesoro: Tion mi tre bedaŭras, mi deziras al li bonan resaniĝon! — Kiu estas ĉe la telefono?

Telefonanto: Mia patro.

Sinpravigo¹⁶

— Tro ofte vi fumas.

— Kial gravas?

— La fumado mallongigas la vivon.

— Bagatelojn vi parolas. La antikvaj grekoj ne fumis, sed ĉiuj mortis senescepte¹⁷.

Ŝi Estas Prava

Patro (parolas telefone al sia malgranda filino): Nu, Gernjo, kion vi faras?

Gernjo: Ĝuste nun mi telefonas, paĉjo.

Nepripensita¹⁸ Respondo

“Aŭdu, knabino, ĉu via patrino estas hejme?” — “Ne, sinjoro, ŝi foriris.” — “Kiam do ŝi revenos?” — “Atendu unu momenton, sinjoro; mi volas demandi ŝin.”

La Dangereco de l' Tifo

En iu societo oni interparolis pri infektaj malsanoj kaj ankaŭ venis al la tifo¹⁹. “Ho,” diris juna oficiro, “tifo estas abomena. Aŭ oni mortas per ĝi aŭ estiĝas idioto. Mi ankaŭ ĝin havis iam.”

Kiel Enlandulo

— Kiel vi progresas lernante Esperanton?

— Tre bone, sinjoro. Mi jam parolas la lingvon kiel enlandulo.

Maljunuloj

— Mia avo mortis je la aĝo de naŭdek kvar jaroj.

— Sed mia avino mortis en la aĝo de cent tri jaroj.

— Ne fanfaronu, kamaradoj! En mia familio estas multaj, kiuj ankoraŭ ne mortis.

Al Kio Oni Povas Kutimiĝi

Pastro vidis kamparaninon, kiu senhaŭtigis angilojn²⁰.

— Kiel vi povas esti tiel kruela — li diris al ŝi — ĉu vi ne komprenas, ke la malfeliĉaj bestoj suferas?

— Ah, — ŝi respondis — mi faras tion jam de dudek jaroj, kaj nun ili sendube tute kutimiĝis al tio.

Saĝa Juĝisto

Juĝisto: Akuzito, kiom da fratoj vi havas?

Akuzito: Du fratojn, via moŝto.

Juĝisto: Vi mensogis: ĉar via fratino diris al mi, ke ŝi havas tri fratojn.

En Malĝusta Loko.

Malsanulo (al la kuracisto): Malgraŭ mia kapdoloro mi fartas ne malbone. Mi manĝas kiel lupo, mi laboras kiel ĉevalo, vespere mi estas laca kiel hundo, kaj nokte mi dormas kiel rato.

Kuracisto: Se estas tiel, mi rekomendus al vi, iri al bestkuracisto.

Malafabla Afablulo

Fraŭlino: Kaj se mi mortus, ĉu vi venus al la funebla ceremonio?

Sinjoro: Certe, fraŭlino, kun granda plezuro!

Ĉefverko

Pentristo A. pentris sian ĉefverkon²¹: “Vaporŝipo en uragano”.

Ĉe la ekspozicio, sinjorino, kiun la artisto demandas pri ŝiaj impresoj, respondas:

— Jes, la bovino estas tre bela; nur la herbo ŝajnas al mi iom tro verda.

Raporto

En Londono unu krimulo devis esti mortigita. Antaŭ sia morto li malsaniĝis kaj oni lin sendis en la malsanulejon. Post unu semajno la ĉefa kuracisto skribis al la juĝejo: “La arestito N. saniĝis, kaj oni povas mortigi sen malutilo por lia sano.”

La Diferenco

Instruisto: “Diru al mi la diferencon inter la fulmo kaj la elektro!”

Lernanto: “La fulmo estas senkosta; por la elektro oni devas pagi.”

Tri Musoj

Superstiĉa princo vidis foje en sonĝo tri musojn: grasan, malgrasan kaj blindan. La princo demandis diveniston, kiu jene klarigis la sonĝon: “La grasa muso estas via ministro, la malgrasa estas via popolo, kaj la blinda estas via portreto, mia princo.”

Ne Nese

Anna, kial vi la ban-akvon por la infano ne mezuras

per la termometro? — Ne neceso, sinjorina moŝto! Tion mi vidas jam tiel! Se infano fariĝas ruĝa, tiam estas la akvo tro varmega, kaj se la infano fariĝas blua, tiam ĝi estas tro malvarma.

Renversita Logiko

Antaŭ longe, en Parizo, policano arestis vagulon, kaj akompanis lin al la policejo. La vagulo ne parolis eĉ unu vorton france (li parolis nur germane), kaj la komisaro tute ne konis germanan lingvon; li do veniĝis francan-germanan interpretiston por pridemandi la arestiton.

— Kie vi naskiĝis? — demandiĝis la komisaro.

— En Parizo.

— En Parizo? Vi do estas franco...

— Ho, ne, mi estas germano.

— Sed, ĉar vi naskiĝis en Franclando, vi ja devas esti franco!

— Kial? Nu, se mi estus naskiĝinta en stalo, ĉu mi devus esti ĉevalo?

Forta Miskompreno²²

Johano, vilaĝano, vizitis sian kuzon loĝantan en la ĉefurbo. La kuzo kaj lia edzino kun granda ĝojo akceptis lin, kaj ili faris ĉion eblan, por ke lia restado ĉe ili estu kiel eble plej agrabla.

Johano spertis la grandan gastamon, sentis sin tre bone ĉe ili, kaj tute ne pensis pri reiro en sian hejman vilaĝon. Tion la kuzaj geedzoj baldaŭ rimarkis, sed ili nenion diris al Johano, kies longa restado komencis esti iom malagrabla al ili.

Kiam la restado de Johano jam fariĝis tiel longa, ke ĝi tedis ilin, la bokuzino ĝentile aludis al li pri foriro, dirante:

— Ĉu vi ne pensis, kara bokuzo, ke via edzino kaj viaj infanoj jam enuas pro tio, ke vi ne estas inter ili?

— Jes, vere, — respondis Johano, — vi estas prava; donu do al mi skribilaron, mi tuj skribos al ili, ke ankaŭ ili venu al vi.

Neniu Scias Nun

Kiam Afanti mem fariĝis loka juĝisto, multaj homoj konkuris amikiĝi kun li. Iu laŭdis lin: “Vi estas tre admirinda, ke vi havas tiom da amikoj!”

Afanti respondis: “Kiom da amikoj mi havas, neniu scias nun. Nur post kiam mi ekŝiĝos de la juĝisteco, oni povos ekscii, kiuj vere estas miaj amikoj.”

Ĝi Diris, ke . . .

Afanti fanfaronis, ke li bone komprenas la birdan lingvon. Lia aserto atingis la orelojn de la reĝo, kiu iun tagon invitis Afanti ĉasi kune kun li. Survoje ili subite aŭdis kelkan ululadon de strigo, kiu staris ĉe preskaŭ defalonta²³ kaverno. La reĝo demandis al Afanti, kion ĝi diris.

Afanti respondis: “Ĝi diris, ke se la reĝo daŭre subpremdos senkompate la popolon, lia regno baldaŭ disfalos same kiel ĝia nestaĉo.”

Morti Du Tagojn Pli Frue ol Vi

Afanti akiris reputacion pro sia aŭgurado kaj iun tagon ŝerce diris al la ĉefministro, ke li mortos morgaŭ. La sekvan tagon la ĉefministro falis de sur ĉevalo kaj efektive mortis. Kiam la reĝo tion eksciis, li eksplodis de kolero kaj tuj sendis soldatojn kapti Afanti. Li kolere demandis: “Afanti, mia ĉefministro mortis pro via mal-